

Esperanto en Skotlando

Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Printempo/Somero 2007 - £2/€3



Speciala eldono:

William Auld (1924-2006)

Esperanto en Skotlando

Numero 195 – Printempo/Somero 2007 – ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson
Helpredaktoro: David Kelso
Administranto: Mia Casey
Lingva konsilanto: Tom Neil

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw
View, Edinburgh, EH4 2QP
Telefono: 0131 332 9803
Rete: ed-robertson@telesvet.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuantojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de *Esperanto en Skotlando*: 14a de aŭgusto 2007. Oni prefere sendu kontribuantojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Microsoft Word ankaŭ estos akceptataj. *Esperanto en Skotlando* uzas la tiparon Gentium, kiu subtenas kaj la tradiciajn esperantajn diakritajn literojn kaj tiujn de ĉiu alia latinalfabeta skribosistemo en la mondo (vizitu <http://scripts.sil.org/Gentium> por deŝuti la tiparon). Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, la H-alfabeto, la X-alfabeto, aŭ la TRENHA-sistemo estas akcepteblaj. *Esperanto en Skotlando* aperas dufoje en la jaro.

Enhavo

William Auld: Iom pri mi	5
La agado kaj verkaro de William Auld	7
La vivo de William Auld en bildoj	10
Paul Gubbins: Forgesita jardeko, forgesita unuaktaĵo	17
Hju Rid: Ma(j)stro de la tradukado	26
Girvan MacKay: Kiel traduki “La infana raso” ?	31
Andrew Weir: Mia unua Universala Kongreso	38
Nekrologo: Edward Ockey (1913-2006)	42

La opinioj esprimitaj en *Esperanto en Skotlando* ne nepre kongruas kun tiuj de *Esperanto en Skotlando* aŭ EAS. *Esperanto en Skotlando* estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: David Kelso
Vic-Prezidanto: David Hannah
Sekretario: David Bisset
Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP.
Telefono: 01698 263 199
Rete: secretary@skotlando.org

El katedro



Redaktora Komento

La vivo kaj verkaro de William Auld

Estas nia tasko en ĉi tiu numero de Esperanto en Skotlando celebri la vivon kaj verkaron de William Auld, kiu forpasis lastjare, kaj la plejparto de ĉi tiu numero estas dediĉita al tio. Ĉi tiu tasko estas kaj trista, kaj ĝoja. Trista, ĉar li ne plu estas inter ni, kaj ĝoja, ĉar li tiom kontribuis al la esperanta komunumo kaj skotlanda kaj mondskala ne nur kulture, sed ankaŭ en sia entuziasmo por la vivo kaj la homaro en ties diversecoj.

La artikoloj pri Bill estas diversaj, same kiel lia verkaro. Ni komencas per aŭtobiografio de li, far li, kune kun resumo de kelkaj ĉefaj eroj de lia verkaro. Aparte plaĉas al ni ke ni povas inkluzivi kelkajn fotojn de Bill kiuj ne aperis publike antaŭe, kaj ni dankas al la familio de Bill pro la rajto reprodukti ilin ĉi tie. Ni atentigu ke la kopirajto pri la fotoj restas ĉe ili.

En publikigo ĉi tie de prelego farita en Glasgovo lastjare, Paul Gubbins atentigas pri jardeko fekunda je literaturaj juveloj, kaj precipe pri ofte preteratentita versdramo de Auld, *Kvazaŭ birdoj konstruas*. Gubbins opinias, ke tiu unuaktaĵo “okupas honoran kaj dignan lokon ne nur inter esperantaj versdramoj sed inter originalaj esperantaj dramoj ĝenerale”.

Hugh Reid traktas en sia artikolo la tradukarton de Auld, kaj bonegan specimenon de la kapabloj de Auld, lia traduko de la *Mastro de l' Ringoj* el la angla de J.R.R. Tolkien. Laŭ Reid, “kompetenta Esperantisto povus tre rapide fari korektan tradukon per kiu oni povus ĝui la verkon de Tolkien, sed Auld havis la kapablon pli riĉigi la rezulton tiel ke ĝi fariĝas majstroverko mem”. Eĉ pli mirinde estas ke Auld faris tion al verko kies kvanta grandegeco estas giganta.

Nia fina artikolo pri la verkaro de Auld estas de Girvan MacKay, kiu okupiĝas pri la defio pri kiel traduki anglan la verkon, kiu pleje famigis Auld, la epopean poemegon pri la esenco de la homaro, *La Infana Raso*.

Ed ROBERTSON

Abonilo

ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

Kotizo al EAS / abono al “Esperanto en Skotlando” por 2007:

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de EAS ricevas “Esperanto en Skotlando” kaj la “Scottish Esperanto Bulletin” senpage.

Sendu al: Membreca Sekretariino S-ino M. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS



Elektu kaj indiku la kategorion

Kotizo al EAS kaj senpaga ricevo de la gazetoj	£6/€9
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£4/€6
Ne-membro en alia lando	£6/€9
Ekstra jarabono de EeS al la sama adreso	£3/€4.50

Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando

£/€

Totala sumo

£/€

Nomo

Adreso

Poŝtkodo

Telefono

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso sube; ekzistantaj abonantoj kiuj ne havas adresŝanĝon povas simple sendi la ĉekon – ne necesas replenigi la formularon. Ĉekoj estas pagendaj al: “Scottish Esperanto Association”. Se pagante per €, vi povas pagi kontantan monon (ne ĉekojn) rekte al la adreso sube, aŭ alternative vi povas pagi en nian UEA-konton **eask-l** kaj sendi al ni la formularon, indikante ke vi jam pagis en nian UEA-konton. Bv. noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de Esperanto en Skotlando eldoniĝas.

Iom pri mi



Mi naskiĝis la 6an de novembro 1924. En 1937 mi konatiĝis kun Esperanto. Temis pri tio, ke mi interesiĝis pri la ĝenerala fenomeno: lingvo; mi svage volis iĝi dulingvulo (la latinan lingvon mi ekstudis lerneje en 1936). Mi do frekventis bibliotekon speciale lingvan en Glasgovo kaj enrigardis lernolibrojn de multaj lingvoj – tre diletante, kompreneble, tamen mi lernis multon **pri** la ĝenerala fenomeno. En skolta gazeto mi vidis la skoltan leĝon kaj promeson en Esperanto kaj la aspekto de la lingvo plaĉis al mi. Mia skoltestro donacis al mi ekzempleron de **Step by Step**, kaj mi estis lanĉita. Iel mi akiris ankaŭ vortaron Edinburgh. Tiuj du libroj akompanis min ĉien, eĉ dum la milito. Emfazindas, ke neniun kontakton mi havis kun la movado aŭ aliaj esperantistoj dum dek jaroj da fidela esperantisteco! Tamen ĉirkaŭ 1941 mia lerneja amiko John Francis eksciis pri Esperanto per mi kaj ankaŭ li lernis la lingvon. Ĝi do restis nia privata afero ĝis post la militfino. Ni – precipe mi – verkis poemojn en Esperanto (kiujn, post konatiĝo en 1948 kun la mirinda esperanta poezio, mi detruis).

Inter novembro 1942 kaj julio 1947 mi estis piloto (aviadilo Spitfire) en nia flugarmeo, kaj plejparte servis eksterlande. Kiam fine de 1946 mi revenis al Britujo, mi vizitis librobotikon en Glasgovo kaj trovis tie grandan stokon de libroj en Esperanto, kiujn mi komencis aĉetadi iom post iom (kaj ankaŭ legegi). En tiu butikio mi renkontis mian unuan esperantiston, flue parolivan, kaj mi konversacie entuziasmiĝis. Mi aliĝis al du kluboj en Glasgovo, la laborista kaj la neŭtrala, kaj ekkonis bravajn geamikojn. Mi aliĝis al BEA kaj IEL, kaj abonis la novan revuon **Esperanto en Skotlando**.

En tiu revuo aperis dum 1948 miaj unuaj eldonitaj verkoj en Esperanto: poemtraduko kaj fantomrakonto. Rezulte de mia poemtraduko mi, poste Francis, konatiĝis kun Reto Rossetti (nia edukonto), kaj nia triopo konstante renkontiĝis por konversacioj, studado de nia literaturo kaj deklamado de esperantaj poemoj. Inter ni, ĉu duope ĉu triope aŭ pli, ni neniam uzis anglan lingvon. Francis kaj mi konscie strebis komplete dulingvigi nin; vespere ni ofte sidis kun vortaro kaj defiis nin pri maloftaj vortoj: “Kiel en Esperanto oni nomas la floron **lesser celandine**?” “Ha! **kelidonio** ... mia vico ...” En mia universitato, kien ni iris post ekŝiĝo de la flugarmeo, mi kutimigis min aŭskulti anglalingvajn prelegojn kaj samtempe prinoti ilin en Esperanto (ĝis tiam mi eĉ ne aŭdis pri simultana tradukado!). Ĉe futbalmaĉoj Francis kaj mi kuraĝigis nian teamon kaj kritikis la decidiston uzante nur Esperanton (ĉar tiu lingvo jam fariĝis natura inter ni kaj tiukuntekste la angla fariĝis fremda – interesa kaj vera konstato).

Mi kompreneble ankaŭ verkis. Mia unua eldonaĵo aperis en 1952, kaj estas jam delonge forgesita: temis pri komisiita traduko de novelo de Jack London, **La Balenodento**. Tuj poste Juan Régulo eldonis nian komunan poemaron **Kvaropo**, kaj mia kariero estis lanĉita. Dum mallonge tempo mi hezitis ĉu verki en la angla aŭ en Esperanto. Mi planis **La Infanan Rason**, kaj eksperimente verkis kelkajn paĝojn en la angla. Fine mi decidis tamen, ke Esperanto estu mia lingvo kaj mi provizore tute rezignis pri anglalingva verkado. Tiun decidon mi certe ne bedaŭras.

Dum temas pri mia junaĝo mi ŝatus mencii, ke mi estis ege sportema. Tion oni nun apenaŭ volus kredi. Mi estis ĉampiono de mia lernejo je tri aĝstadioj, kaj en la flugarmeo reprezentis ĝin je 100- kaj 200- metra vetkuro en Rodezio [nun Zimbabvo] kaj poste en Palestino. Mi ludis futbalon (kiel golejisto ĉefe) lerneje, flugarmee kaj universitate. Mi boksis. Aliajn sportojn mi ludis sporade.

Mi tre aktivis en la internacia movado. Mi estis ano de la kvaropo kun Lapenna, kiu prizorgis translokigon de la Centra Oficejo el Anglujo al Roterdamo. Kiel redaktoro mi redaktis sinsekve **Esperanto en Skotlando**, **Revuo Esperanto**, **Monda Kulturo**, **Norda Prismo**, **Belarto**, **Fonto** kaj **La Brita Esperantisto**. Miaj eldonitaj libroj nombras ĉirkaŭ 40 [nun 50]. Profesie mi estis instruisto kaj fariĝis viclernejestro.

William AULD

La agado kaj verkaro de William Auld

– kelkaj eroj

Reformoj en UEA:

Estis unu el la kvaropa teamo (Lapenna, Vermaas, Fighiera, Auld), kiu translokigis la Centran Oficejon de UEA el Anglujo ĝis Roterdamo. Li rolis interalie kiel interpretisto kaj tradukisto kaj iĝis redaktoro de novigita revuo *Esperanto*. Li respondecis ankaŭ pri la *Jarlibro* tiujare. Poste redaktis por UEA la revuojn *Monda Kulturo* kaj *Belarto*.

Instruado:

Gvidis kursojn en siaj urboj kaj lernejo, kaj plurfoje en la *Somera Lernejo* en Wedgewood Kolegio, Barlastono. En 1970 li estis invitita iniciati la gravajn kursojn en Ŝtata Universitato Sanfrancisko, kaj ripetis tion ĉiujare ĝis inkluzive 1977. Tiuj kursoj daŭras ĝis nun, ĉiam pli kaj pli sukcese. Vizitis la kursojn en 1971 usona eldonisto Channing Bete, kiu komisiis de Auld triopon da libroj, el kiuj unu estis *A First Course in Esperanto* ellaborita de Auld por enkonduki la lingvon al komencantoj en Sanfrancisko. Aliaj lernolibroj de Auld estas *Esperanto: A New Approach* (1965) kaj *Paŝoj al Plena Posedo* (1968 kaj pluaj kvin eldonoj).

La brita movado:

Ekde oktobro 1971 ĝis 1999 Auld daŭre redaktis la gazeton *La Brita Esperantisto* (antaŭe *The British Esperantist*). Li pli frue redaktis diversajn revuojn ekde 1949.

Universala Esperanto-Asocio:

Li estis dum multaj jaroj komitatano de UEA, kaj servis kiel vicprezidanto de UEA dum unu deĵorperiodo.

Akademio:

Li estis elektita al la Akademio, kaj sekvis Prof-on Waringhien kiel ties prezidanto, sed poste forlasis la Akademion pro internaj malfacilaĵoj.

Intervjuoj k.s.:

Li estis ofte intervjuita en radio kaj televido, ne nur en Britio sed ankaŭ eksterlande (inkluzive de Finnlando), kaj ankaŭ en Radio Kubo kaj Radio Varsovio. Intervjuoj kaj sufiĉe ofte leteroj de li aperis en multaj, eĉ foje gravaj britaj ĵurnaloj.

Prelegoj:

Li multe prelegis, ekzemple plurfoje en la Internacia Somera Universitato kaj dufoje en Sarlando. Plejofte liaj prelegoj estis eldonitaj libroforme (vidu *Esearoj*). Li estis ĉefparolanto ĉe la Internaciaj Floraj Ludoj en Taragono.

Biblioteko:

Li posedis bibliotekon de pli ol 4000 esperantaj libroj, inkluzive de la plimultaj inkunabloj, kaj binitaj jarkolektoj de la plej gravaj periodaĵoj, plus miloj da nebinditaj revuoj ktp. La binitaj jarkolektoj inkluzivas *La Esperantisto* kaj aliajn frutempajn periodaĵojn, ekzemple *Lingvo Internacia*. Tiu biblioteko, escepte de la nebinditaj revuoj, estis zorge katalogita kaj ordigita sur bretaroj en lia domo. En 2000, Auld donacis la tutan kolekton al la Nacia Biblioteko de Skotlando.

Universalaj Kongresoj:

Kiam li disponis pri la necesaj monrimedoj li ĉeestis UK-ojn inter Marsejlo (1957) kaj Varsovio (1987), kaj ĉiam akceptis diversajn taskojn en la kongreso. En 1987 oni nomis lin honora membro de UEA; pli frue li estis nomita honora membro de la usona landa asocio ELNA, rekone al lia laboro por Esperanto en Sanfrancisko.

Poemaroj:

Spiro de l' pasio (1952); *La infana raso* (1956); *Unufingraj melodioj* (1960); *Humoroj* (1969); *Rimleteroj* (kun Marjorie Boulton, 1976); *El unu verda vivo* (1978); *En barko senpilota* (1987); *Unu el ni* (1992).

Lernolibroj:

Esperanto: A New Approach (1965); *Paŝoj al plena posedo* (1968); *A first course in Esperanto* (1972); *Tradukul!* (1993).

Bibliografio:

Bibliografio de tradukoj el la angla lingvo (kun Edmund Grimley Evans, 1996).

Antologioj:

Angla antologio 1000-1800 (poezia redaktoro, 1957); *Esperanta antologio* (1958/1984); *25 jaroj* (poezia redaktoro, 1977); *Skota antologio* (kunredaktoro, 1978); *Sub signo de la socia muzo* (1987); *Nova esperanta krestomatio* (1991); *Plena poemaro: Miĥalski* (red. 1994); *Tempo fuĝas* (1996).

Esearoj:

Facetoj de Esperanto (1976); *Pri lingvo kaj aliaj artoj* (1978); *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979); *Vereco - distro - stilo* (1981); *Kulturo kaj internacia lingvo* (1986); *La fenomeno Esperanto* (1988); *La skota lingvo, hodiaŭ kaj hieraŭ* (1988).

Tradukaĵoj:

El la angla: *La balenodento*, de Jack London (1952); *Epifanio*, de Shakespeare (1977); *La urbo de terura nokto*, de James Thomson (1977); *Don Johano*, Kanto I, de Byron (1979); *La robajoj de Omar Kajam*, de Edward Fitzgerald (1980); *La sonetoj*, de Shakespeare (1981); *Fenikso tro ofta*, de Christopher Fry (1984); *Montara Vilaĝo*, de Chun-chan Je (1984); *La graveco de la Fidelejo*, de Oscar Wilde (1987); *La komedio de eraroj*, de Shakespeare (kun Asen N. Simeonov, 1987); *Omaĝoj - Poemtradukoj* (1987); *Gazaloj de Hafez* (1988); *Spartako*, de Leslie Mitchell (1993); *La stratoj de Aŝkelono*, de Harry Harrison (1994); *Teristrato*, de Douglas Dunn (1995); *La kunularo de l' ringo*, de J.R.R. Tolkien (1995); *La du turegoj*, de J.R.R. Tolkien (1996).

El la skota: *Kantoj poemoj kaj satiroj*, de Robert Burns (kun Reto Rossetti, 1977).

El la sveda: *Aniario*, de Harry Martinson (kun Bertil Nilsson, 1979).

Kantaroj:

Floroj sen kompar' (kun Margaret Hill, 1973); *Kantanta mia bird'* (kun Margaret Hill, 1973); *Dum la noktoj* (kun Margaret kaj David Hill, 1976).

La vivo de William Auld en bildoj



William Auld kiel infano, 1920aj jaroj



William Auld en uniformo, 1940aj jaroj



William Auld en flugista jako, 1940aj jaroj



William Auld, 1940aj jaroj



William Auld kun Spitfire, 1940aj jaroj



William Auld kun infanoj, 1950aj jaroj



William Auld kun Meta, 1950aj jaroj



William Auld, fruaj 1950aj jaroj




William Auld kun Meta, 1970aj jaroj



William Auld, fruaj 1960aj jaroj



William Auld kun Meta, 1970aj jaroj



William Auld, 1980aj jaroj



William Auld kaj Meta en Hispanio, 1990aj jaroj



William Auld ĉe Internaciaj Floraj Ludoj, Katalunio, 1990aj jaroj

Forgesita jardeko, forgesita unuaktaĵo

William Auld kaj la esperanta versdramo.

Eltiraĵo el prelego prezentita en Glasgovo, en decembro 2006.

La 1950aj jaroj, almenaŭ de brita perspektivo, facile pretervideblas. Mankas al la jardeko la bruo de la 1940aj jaroj, la brilo de la 1960aj. Tamen de esperanta vidpunkto la jardeko kaj bruis kaj brilis.

Certe en la mension de ĉiu esperantisto almenaŭ iom informita pri la historio de sia lingvo ensaltas la jaro 1954. Memorindas Montevideo ... kaj ne nur la kato nomita tiel de Marjorie Boulton por celebri mejloŝtonon en la evoluo de Esperanto. En tiu ĉiu sudamerika urbo, dum la 4a ĝenerala konferenco de Unesko, estas akceptita rezolucio dediĉita al Esperanto, per kiu estis agnoskataj i.a. la ‘rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de internaciaj rilatoj’.

Sed gravas ne nur Montevideo. En la 1950aj jaroj estas lanĉitaj la esperantaj karieroj de kelkaj el niaj plej gravaj, britaj aŭtoroj. En 1955 debutis Marjorie Boulton per *Kontralte*; rapide sekvis en 1956 *Kvarpieda kamarado*, en 1957 *Cent ĝojkantoj*, en 1959 *Eroj kaj aliaj poemoj* kaj la dramo-kolekto *Virino ĉe la landlimo*. Aperis samjardeke ŝiaj unuaj artikoloj. Krome ne forgeseblas, ke en 1952 estas eldonita *Kvaropo*, kiu kulpas pri la eventuale iom mita skota skolo (John Francis, kies verkista reputacio datiĝas de tiu ĉi jaro, atentigis dum la centjariĝa skota kongreso en Largs, ke apenaŭ eblas paroli vere pri ‘skota skolo’); simile, per *Kvaropo*, kaptis la atenton de la esperanta publiko Reto Rossetti, kies *El la maniko kaj Pinta kraĵono* sekvis en respektive 1955 kaj 1959. Kaj neniel preteratentebblas William Auld, kies famo rapide establiĝis en tiu ĉi jardeko, ne nur per *Kvaropo* sed ankaŭ per la unua poemaro (*Spiro de l’ pasio* [1952]), la unua traduko (*La balenodento*, de Jack London [1952]), kaj la unua antologio (*Angla Antologio 1000-1800* [1957]). Do estas naskitaj dum tiu ĉi argumenteble pala jardeko pluraj gravaj esperantaj reputacioj.

Sed ĉio ĉi prezentas nenion novan. Jen faktoj facile kontroleblaj en biblioteko aŭ en interreto. Tamen tio, kio tie ne troveblas, estas la scio, ke en tiu ĉi jardeko aperis la plej alta koncentriĝo de versdramoj iam publikigitaj en la historio de originala esperanta literaturo.

Ne abundas versdramoj en la kanono de la presita verda teatro. El preskaŭ 300 originalaj esperantaj dramoj analizitaj kaj prinititaj, rimarkeblas – depende de la maniero interpreti la nocion ‘versdramo’ – 14, eventuale 15 dramojn tiajn. Tio reprezentas iom malpli ol 5% de la tuta esperanta dramarto. Cetere frapas la fakto, ke sep el tiuj ĉi versdramoj (t.e. pli malpli duono) estas publikigitaj dum la 1950-aj jaroj. Jenas la sepopo: en 1953 *Ivan la Sesa*, de la poeto Geraldo Mattos, kaj *Kvazaŭ birdoj konstruas*, de la poeto William Auld; en 1955 *Ĉe l’ akvo de forgeso*, de la poetino Marjorie Boulton; en 1957, same de Marjorie Boulton, *Virino ĉe la landlimo* (kiu fariĝis titolo de dramo-kolekto publikigita en 1959), kaj *Jozefo*, de Jakob Applebaum; en 1958 *Sonĝe sub pomarbo*, de la poeto kaj aktoro Julio Baghy; kaj en 1959, ankoraŭfoje de Marjorie Boulton, kaj aperigitaj en la kolekto *Virino ĉe la landlimo*, la ĉarma, prikata ‘fantazia drameto por infanoj’ *La fremduloj kaj la pli nigra*, sed samtempe optimisme lirika dramo *La morto de Kabir*. Flanke menciendas la *Jubilea eposo* de Reto Rossetti, hibrida verko, ĉar longa poemo pri la historio de Esperanto sed sursceneje prezentata dum la Universala Kongreso de 1955 en Bologna, Italujo.

Notindas, ke, el la kvin aŭtoroj (ĉi-teze flankenlasata estas Rossetti), du – Auld kaj Boulton – estas britoj, dum la tria, Applebaum, kvankam denaska polo, loĝis ekde 1900 en Anglujo; notindas ankaŭ, ke el la kvin nomoj, kvar apartenas al renomaj poetoj kaj la kvina, tiu de Applebaum, al tradukanto, kies prozo en la 1950aj jaroj jam premiigis en la belartaj konkursoj de UEA.

El la aliaj versdramoj, verkitaj ekster tiu ĉi enorme fekunda periodo (almenaŭ de la vidpunkto de lirikaj teatraĵoj), menciindas *Gustav Vasa*, de Reinhold Schmidt, el la 1910a jaro (parenteze tute erare priskribita en la *Enciklopedio de Esperanto* kiel la unua originala esperanta dramo; plej verŝajne tiu ĉi honoro apartenas al *La duonokulvitro* de la nekonata franc-alĝeriano Aŭgusto Baissac; kaj inter *La duonokulvitro* de 1905 kaj *Gustav*

Vasa de 1910 aperis ĉ. 25 ĝis nun apenaŭ esploritaj originalaĵoj). Inter aliaj versdramoj menciindas ankaŭ la relative bone konata *Ginevra*, de Edmond Privat, el la jaro 1913; eventuale *Pordegoj*, de Bernando Ojasono, el la jaro 1939; kaj certe la du elegantaj kaj rafinitaj versdramoj de Mauro Nervi el la jaro 1978, *Klitemnestra* kaj *Parabolo*. Ankaŭ Edwin de Kock, en 1975, aperigis versdramon: *Rekomencu* en la kolekto *Plu konstruu*. Ekzistas en la historio de la originala esperanta teatro ankaŭ provoj verki operojn, ĉi tie ne konsideratajn.

Analizado de la temaro de la versdramoj indikas, ke la intrigoj inspiriĝas – ĉu rekte, ĉu nerekte – de la biblio (*Jozefo*, *Sonĝe sub pomarbo*), historio (*Gustav Vasa*, *Ginevra*) aŭ de helenaj aŭ klasikaj fontoj (*Kvazaŭ birdoj konstruas*; *Ĉe l' akvo de forgeso*, *Klitemnestra* kaj, almenaŭ ĝis difinita grado, *Parabole*). Nur Marjorie Boulton turnas la dorson al tiuj ĉi tradiciaj, klasikaj fontoj kaj sukcese – kaj nature – enbuŝigas versojn al ordinaraj homoj en rekoneblaj, ĉiutagaj cirkonstancoj. Tiel ŝi pritraktas ekzemple la milito-hororojn en *Virino ĉe la landlimo* aŭ, malgraŭ tio, ke la intrigo okazas en la 15a jarcento, la finon de homa ekzisto en *La morto de Kabir*.

Leviĝas, cetere, la demando, kial la 1950aj jaroj tiom favoris, almenaŭ en Esperanto, la versdramon. Certe en la angla en la sama epoko tiu ĉi ĝenro apenaŭ rimarkeblis. Esceptoj estas la verkoj de T.S.Eliot (*The Cocktail Party*, 1950; *The Confidential Clerk*, 1954; kaj *The Elder Statesman*, 1959); aŭ de Christopher Fry (*The Lady's Not for Burning*, 1949; *Venus Observed*, 1950; kaj *The Dark Is Light Enough*, 1954). En la angla, kiel en la franca, aŭtoroj kiel Eugène Ionesco, Samuel Beckett aŭ Harold Pinter okupiĝis pri absurdismo. Tiel reagis dramverkistoj al konfuza, ŝajne sendia, postmilita mondo, kreante siajn proprajn mitojn por klarigi la homan ekziston; en Esperantujo, tamen, la poetoj turnis sin al alia ĝenro, ne al relative nova, avangarda absurdismo, sed al esence tradicia – klasika, helena kaj, memevidente, ŝekspira – versdramo. Aliflanke eblas argumenti, ke, ĝuste per versdramoj, la poetoj tamen kreis sian, kaj aparte esperantan, avangardon, ekspluatante ĝenron nur sporade uzitan ĝis la 1950aj jaroj.

Tiu ĉi diferenco inter la karakterizaĵoj de la esperanta kaj la neesperanta dramarto de la 1950aj jaroj – do tradicio kontraŭ avangardo – indikas alian, en esperantaj rondoj malmulte diskutitan fenomenon. Evidentas, ke

la teatraj modoj aŭ movadoj de la epoko preterpasis esperantajn dramverkistojn, kiuj verkis flanke de la fluoj, kiuj tiam ondumis trans Eŭropo. Alivorte – kaj la komentoj limigas sin al la 1950aj jaroj: neprus pli ampleksa studaĵo por ĝeneraligi la tezon – esperanta dramarto, almenaŭ tiel, kiel ĝin praktikis kelkaj el ĝiaj tiamaj plej kapablaj kreantoj, progresis sendepende de kulturaj kaj ĝenraj evoluoj, kiuj stampis la teatran historion de la epoko. Ĉu beni, ĉu malbeni ĉi tiun sendependecon, fariĝus temo por interesa debato: ĉu fine estus pli riĉa la esperanta dramarto, se verdaj verkistoj estus ekspluatantaj la absurdajn rimedojn, pri kiuj ili sendube konsciis? Argumenteblas, ke la manko de esperanta publiko (aŭ almenaŭ la fakto, ke esperanta publiko jare nur unu fojon amase kunvenas), la manko de teatroj kaj trupoj, kaj eĉ tradicio teatra, ebligis al verkistoj resti netuŝataj de la grandaj eventoj de la jardeko kaj, simple, fosi sian sulkon. Denove: jen temaro por plia, kaj profunda, studaĵo.

Sed, por reveni al la sep versdramoj de la 1950aj jaroj, ne eblas nei la kvaliton de la verkoj. Kiel dirite, ilin kreis ĉefe poetoj, unu jam establita (Baghy), la aliaj sursojle de brilaj, stelaj karieroj en Esperantujo (Auld, Boulton, Mattos). Ĉiuj meritas legadon, studadon; certe tiuj de Auld kaj Boulton meritas surscenejigon. Kune kun la du dramoj de Nervi, la sep lirikaj teatraĵoj reprezentas esence la apogeon de esperanta versdramo. Post Nervi, kiu verkis antaŭ preskaŭ 30 jaroj, velkis intereso pri la ĝenro, kiun nunaj poetoj ŝajne ignoras. Tamen estu flanke notite, ke unu el la teatraĵoj en la belartaj konkursoj de UEA en 2006 estis ja versdramo: evidente, kaj malgraŭ tio, ke la konkursaĵo ne premiigis, la ĝenro ne tute velkis. Sed verŝajne, por verki sukcesan versdramon, nepras esti poeto: rimantoj, versfarantoj kaj aliaj vortĵonglistoj prefere ne provu.

Tio ne signifas, kompreneble, ke bona poeto, kiu verkas poezie brilan dramon, aŭtomate fariĝas bona dramverkisto. Tamen, kaze de la kvin versdramistoj de la 1950aj jaroj, direblas, ke ili ĉiuj komprenis la apartajn bezonojn de la teatro. Cetere, la kvalito de tri el la sep versdramoj el la jardeko estas premie rekonita en la belartaj konkursoj: unuajn premiojn ricevis *Kvazaŭ birdoj konstruas* en 1953 kaj *Ĉe l' akvo de l' forgeso* en 1955; duan premion ricevis *Virino ĉe la landlimo* en 1957.

Kvazaŭ birdoj konstruas, diskutota ĉi tie en la mortojaro de ĝia aŭtoro, William Auld, kaj honore kaj memore al li, estas publikigita en *Unufingraj melodioj*, kiu aperis en 1960. Elementoj de la intrigo memorigas ne nur pri la edzino de Odiseo, Penelopo, kiu dum jaroj fidele atendis sian forvojaĝintan kaj aventureman edzon, sed ankaŭ pri la Mozart-a opero *Così fan tutte*. En la opero du amantoj testas la fidelon de siaj amatinoj: la paro, ŝajne foririntaj al la milito, revenas, alivestitaj kiel albanoj, kaj, malgraŭ unua rezisto de la esence virtaj virinoj, sukcese kaptas iliajn korojn. Ĉe Auld, simile, pivotas la intrigo ĉirkaŭ tio, ke ‘La korpo havas siajn apetitojn’ (p.103). [1]

Do, komence de *Kvazaŭ birdoj konstruas*, videblas Prokris, kies edzo Cefalo, reĝo de Ateno, eksterlande militas (p.103). Prokris scias, ke pro la foresto de Cefalo estas ‘malfacile / Teni akra la glavon de mia edzina fidelo’ (p.81). Servistino, Rodopea, anoncas fremdulon, sed Prokris firme ordonas, ke tiun la servistino ne enlasu. Sekvas tiam unu el tiuj belaj dramaj momentoj, kiam la koro diktas al la kapo, aŭ almenaŭ la subkonscio al la konscio – kaj ĝin venkas. Dirinte, ke oni ‘gastigu lin / Laŭ la pretendoj de lia rango’ (p.82), Prokris ne permesas, ke la servistino foriru por plenumi ŝian ordonon. Male, ŝi plu dialogas: ‘Rodopea, sentaŭgulino, vi ne sciigis al mi / La nomon de nia vizitanto’ (p.82). Jen, per ŝajne bagatela demando, Prokris montras sin homo, ne simple reĝino: venkas scivolemo saĝecon, senedza enuo prudenton, ĉar en sia koro, en sia subkonscio, Prokris ne volas, ke Rodopea forigu la fremdulon.

La sekva dialogo ebligas al la fremdulo, kiu nomiĝas Briseo, eniri kaj prezenti sin antaŭ la reĝino. La entrudinto (per vortoj komedie ekspluateblaj de bonaj reĝisoro kaj aktoro) substrekas, kiel ĉiuj amontoj, ke ‘Nur vortojn mi deziras / Interŝanĝi, nur vian animon admiri mi celas’ (p.86); Prokris memorigas lin, ke ŝi estas edzino. Briseo cinike rimarkas: ‘De edzinoj / La mondo plenas, tamen por trovi ĉaston / Similan oni vojaĝus tra tutaj landoj / Sensukcese’ (p.87). Fronte al la rezisto de Prokris, Briseo rezonas, ke ‘amo / Sen nutro de intima intertrakto velkas’ (p.88). Lia opinie nepras daŭre kaj aktive ami (p.89):

Ĉu ardo estu sterila? Amo sopiras
Al vivo, al vervo, al la varma intimo

De la komuna nokto, al la tag-al-taga
Refreŝigo kaj replenumiĝo. Sufoko, ŝtoniĝo –
Ĉu tio estas la amo?

Finfine Prokris cedas, konfesante, ke ŝi lin deziras. Briseo forŝiras sian barbon: tie staras Cefalo, konvinkita, ke Prokris lin ne la unuan fojon perfidis. Rodopea certigas, ke Prokris fidelas, kaj amare notas, ke viroj en ‘pekema mondo’ rajtas malĉasti; virinoj ne (p.98). Prokris ‘seke’ pardonos sian edzon pro la trompo (p.101) sed atentigas, ke tiel li preskaŭ estingis la fajron de amo: ‘Necesas la nigriĝantajn karbojn priblovi / Singarde kaj obstine por ĝin reflamigi’ (p.102). Kiel en *Cosi fan tutte*, la komedio tanĝas tragedion: la ama, fidela rilato inter edzo kaj edzino estas rompita pro la ruzo, pro la trompo de Cefalo. Amo, evidente, estas fajna, facile frakasebla afero, kiu toleras nek mensogojn, nek memismon flanke de unu el la partneroj: jen la kerno de la komedio.

Do kiel procedi? Kiel ripari la damaĝon? Nu, kiel en multaj dramoj, estas la servistino, Rodopea, kiu fine pli saĝas, aŭ almenaŭ pli saĝe agas, ol la gemastroj. Cefalo ne komprenas, kial Prokris turnis sin kontraŭ lin, kial ŝi montris al li ‘fridan manon’ (p.103). La servistino, tamen, insistas (p.99):

Via edzino estas ĉasta! Malprave
Kaj maljuste vi traktis ŝin, kaj mi esperas,
Ke ĝustatempe honto malfermos al vi
La okulojn.

Sed ne estas honto, kiu malfermas al li la okulojn. Estas Rodopea mem, kiu, aplikante psikologion ne tute konvinkan (tamen temas pri komedio, ne pri scienca studaĵo), klarigas la ŝajnan perfidon de Prokris, nome, ke ŝi pretis akcepti Briseo-n, tiel, ke ‘senerara instinkta rekono’ (p.100) tiris ŝin al la edzo, kiun ŝi korpe, se ne tuj mense, rekonis.

Efektive, se la psikologio montriĝas iom supraĵa, iom leĝera, tiel ankaŭ la premiso, ke Cefalo ne komprenas la koleron de lia edzino. Certe, la konfuzo, la perplekseco de Cefalo kontribuas al unu el al plej ĝuindaj kaj komediaj momentoj en la unuaktaĵo, kiam en la spaco de unu paĝo li

kapriolas inter kolero, seniluziiĝo, amaro, senespero, surprizo, senpovo kaj fine frustracio. La interveno komenciĝas kolere (p.96):

Ho, sentaŭga virino! La hidajn dubojn,
Kiu dum la senfinaj tagoj de nia diseco
Min insidis kaj kaŝatendis, mi ĉiam
Repugne rebatis, ĉar mi supozis vin virta.

Kaj, kiam Prokris foriras, ne tolerante la memkompaton de la edzo, la monologo finiĝas frustracie per suka sakraĵo: 'Kalso de Dio!' Sed eblas argumenti, ke al la karakterizado de Cefalo – iu, kiu ne komprenas, kial lia edzino froste kaj fride lin traktas post lia ruzo, post lia fideleco-testo – mankas subtileco, mankas kredebleco.

Pro tio, eble, John Francis, en la enkonduko al *Unufingraj melodioj*, severe traktas *Kvazaŭ birdoj konstruas*. Li notas, ke ĝia 'lerta sed memkonscia dialogo havas malmultan dramatan valoron'; ke la verko 'donus pli da plezuro al sia aŭtoro ol al la publiko' (p.18). Ke la unuaktaĵo havas 'malmultan dramatan valoron', ne plene pravigeblas: la menciita monologo de Cefalo, kun ĝia gamo de emocioj, prezentus bonan defion al aktoro (kaj servus, ekzemple, kiel taŭga prov-parolado aŭ deklamado por studanto pri aktorado); kaj dum la dramaj, anstataŭ la poeziaj ecoj, ne tuj desaltas de sur la paĝo, kompetenta reĝisoro trovos multon en *Kvazaŭ birdoj konstruas* por teatre prilabori. Memorindas, ke surscenejigis la komedion en 1976 – do antaŭ 30 jaroj; tiel esperantistoj neglektas sian originalan dramarton – la Teatro-Trupo de Tuluzo, Francujo.

Sed eble, jes, la verko donis 'pli da plezuro al sia aŭtoro ol al la publiko'; eble la aŭtoro plezuro kuŝis pli en la lingvo, en la versfarado – parenteze tre glata, tre polurita – kaj ne en la karakterizado. Eblas diri, ke, same kiel ŝvebas demando-signoj super Cefalo, kiu ne komprenas la koleron de sia edzino, ankaŭ ĉirkaŭas nekredibleco la sintenon de Prokris, kiu, ja kolera, rapide – eventuale tro rapide – cedas kaj reakceptas sian edzon. Dirinte, ke Cefalo preskaŭ estingis la fajron de ŝia amo, Prokris du paĝojn poste estas pardoninta la trompinton: 'Mi ne povas koleri vin, ĉar via vireco / Renkontis foje mian inecon kaj ĝin prenis / Al si por ĉiam' (p.104). Do amo ĉion venkas: sed ĉu tiel fulme? Dependas ĉio de du

adverboj: ‘preskaŭ’ kaj ‘verŝajne’. Prokris informas la edzon: ‘La fajron vi preskaŭ sukcesis estingi’ (p.102); poste ŝi diras: ‘Necesas la nigriĝantajn karbojn priblovi / Singarde kaj obstine por ĝin reflamigi, / Verŝajne’ (p.102). La du adverboj entenas la ŝlosilon al la pardono, al la reakcepto de Cefalo: sed ilia ĉeesto ebligas tro rapidan kaj tro facilaniman solvon al la situacio (kaj siavice malfortigas la supozatan koleron de Prokris).

Tamen, se la intrigo iom streĉas la kredeblecon (tamen ne pli, ekzemple, ol *Così fan tutte*), tute ne la lingvo la orelojn. Eble en la versfarado, kaj la natura uzo de Esperanto ene de la liriko, kuŝas la ĉefa virto de *Kvazaŭ birdoj konstruas*. La pentametroj elegante, elokvente sekvas unu la alian; cetere memorindas, ke la komedio en la unuaktaĵo devenas ne aparte de la intrigo (kie, krom ĉe la fino, ĉiam apudas tragedio) sed plejparte de la lingvo. Tiel, ekzemple, Prokris petas, ke la nekutime silenta servistino Rodopea pli detale informu pri la alveninta fremdulo (p.82-3):

Ĉu io tranajlas al vi la langon, knabino?
Ordinare ĝi flirtas kaj klakas kvazaŭ lavaĵo
Blovata de bruska vento, sed nun,
Pri simpla alveno de iu sinjoro
Ĝi kuŝas mute kiel limako sur laktuka
Folio. Kial vi nenion diras?

Efektive, tri metaforoj (tranajlita lango, blovata lavaĵo, laktuka limako) por esprimi la ĉiutagan: ‘Kial vi nenion diras?’

Kaj jen la sceno – verŝajne pli efika enteatre ol surpaĝe – kiam Rodopea pikas la bombaston de la enamiĝinta Briseo. Tiu melodrame, histrione demandas (p.92):

Ĉu vi estas dura kiel diamanto, reĝino?
Ĉu eĉ ne unu guteto de kompatato moligas
Vian koron pri mizerulo malespere
Vin amanta?

Respondas seke Rodopea: ‘Ah, ĉesu. Kion signifas / Ĉi tiu buŝmuelado pri amo / Al mia mastrino?’ Kaj estas Rodopea, kiu klarigas al Cefalo, kiom li

ofendis sian edzinon: ‘Se ŝi havas tiom sagacon, kiom pulo / Mense malmatura, ŝi furzos pri via / Pardonon’ (p.97). Denove, ĝuindaj metaforoj – kaj, pro la lingvo, pro la nature amuza, metafore riĉa vortumado, imageblas, ke *Kvazaŭ birdoj konstruas* pli brilus sur la scenejo ol inter la kovriloj de libro (efektive pri ĉiu respektinda teatraĵo eblas tion diri): nepras aktoroj kapablaj eligi la komediajn nuancojn, la melodramon, la humuron, kiuj kuŝas pli en la vortoj, en la versoj, ol en la intrigo kaj foje dubinda karakterizado.

Leviĝas la demando, kial Auld ne verkis pli por la teatro. Jen unu el tiuj demandoj, pri kiuj oni ne pensas, ĝis tro malfruas ĝin starigi rekte ĉe la koncernato. Kiom ofte oni pasigas tempon, babilante – ja agrable, kaj foje necese – pri ĉiutagaĵoj; tamen evitante la gravajn aferojn, kiuj postulas pensadon, respondojn? Konjekteble Auld sentis – malgraŭ la unua premio por *Kvazaŭ birdoj konstruas* en la belartaj konkursoj – ke funde li estas poeto, ne dramverkisto; ke vortoj, pli ol karakteroj, metriko, pli ol intrigo, lin allogas. Tio ne signifas, ke dramo forestis el vivo kaj verkaro: male. Majorie Boulton memorigas, en siaj adiaŭaj vortoj pri Auld en la novembra numero de *Esperanto*, kiel bone li aktoritis en la drametoj, kiujn ŝi verkis por la barlastona somerlernejo; kaj troveblas poemoj monologe tute dramecaj kaj tiel prezentablaj (ekz. ‘Ebrio’ en la kolekto *Spiro de l’ pasio*). Do fine esperantistoj estu dankaj, ke inter la vasta kaj genia verkaro de Auld troveblas almenaŭ unu teatraĵo: teatraĵo, kiu malgraŭ kelkaj riproĉendaĵoj tamen okupas honoran kaj dignan lokon ne nur inter esperantaj versdramoj sed inter originalaj esperantaj dramoj ĝenerale.

Esperantistoj estu ankaŭ feliĉaj pro la unuaktaĵo, kies titolo devenas de Kalocsay: ‘Ho, feliĉuloj, kiuj, kvazaŭ birdoj, / Konstruas neston post la enamiĝo / El molaj plumoj de la dolĉaj virtoj’. Ankaŭ ili estu feliĉuloj, ĉar William Auld konstruis dramon el molaj plumoj de dolĉaj versoj.

1. *Kvazaŭ birdoj konstruas* estas publikigita en *Unufingraj melodioj* (La Laguna: Stafeto, 1960. 126p., 77-106). Citaĵoj uzataj en la prelego devenas de tiu ĉi eldono.

Paul GUBBINS

Ma(j)stro de la tradukado

La Auld-a tradukado de “Mastro de l' Ringoj”

La viro kiu instruis al mi la hobojon estis profesie instruisto en baza lernejo. Estis li kiu unue parolis al mi pri *The Lord of the Rings* kaj diris ke, pro tio ke li malemis sekvi popularajn modojn, li ne legis ĝin en la tempo kiam ĝi furoris, kiam li estis universitata studento. Sed nun deĵorante en baza lernejo li malkovris ke ĝi estis mirinda rakontego por legi al la geinfanoj.

Poste, kiam mi fariĝis mem studento universitata, okazis denova entuziasmo inter la gestudentoj, kvankam ne tioma, por tiu ĉi fabela libro. Adoptinte la saman sintenon de mia instruisto, mi ankaŭ evitis legi *The Lord of the Rings*. Nur post la universitataj studoj, kiam mi pasigis ses semajnojn en Gibraltaro, mi bezonis ion por spicigi la enuon de vivo en eta teritorio. La nura libro kiu povus interesi min estis la biografio de J.R.R Tolkien.

Mi fasciniĝis pri la viro. Li estis profesoro pri la antikva angla lingvo en la Universitato de Oksfordo kaj havis intereson ankaŭ pri aliaj lingvoj precipe la scandinaviaj kaj la suoma. Li aldone havis senton ke la angla popolo perdis sian mitologion kaj li starigis al si la taskon mem rekrei ĝin. Li komencis verki *The Silmarillion* kiu estis kolekto de rakontoj pri la inventita *Meza Tero*, pri ĝia historio kaj la popoloj kiuj loĝis en ĝi, kaj li laboris super ĝi dum la tuta vivo. La porinfana rakonto *The Hobbit* kaj la romanego *The Lord of the Rings* estis bazitaj sur la gentoj, la eventoj kaj la bataloj en la malfrua parto de *The Silmarillion*. Tolkien intencis publikigi *The Lord of the Rings* kune kun *The Silmarillion* sed evidentiĝis ke ne estus eble pro tempolimoj postulitaj de la eldonisto. Li do turnis sian plenan atenton al *The Lord of the Rings*, fakto pri kiu amantoj de la libro estas ege dankemaj.

Tolkien inventis lingvojn, kaj la mitologiaj popoloj kiujn li kreis estis la parolintoj de tiuj lingvoj. Frapis min la zamenhofeco de tiu sinteno. Zamenhof rekonis ankaŭ ke lingvo apartenas al popolo kaj li transdonis Esperanton al la Esperantistoj. Ambaŭ homoj verkis mirindajn kreaĵojn.

Nu, post la legado de la biografio mi sentis volegon legi la famegan verkon. Tiutempe en Gibraltaro, mi sukcesis ekhavi nur *The Hobbit*. Ĝi estis la libro por kiu Tolkien intencis ke *The Lord of the Rings* estu la sekvaĵo. Ĝi estis porinfana kaj do en porinfana stilo. Mi tamen ĝuis ĝin, akceptinte la stilon, sed neniam sentis la entuziasmon kiun raportis aliaj pri *The Lord of the Rings*.

Finfine, denove en Skotlando, la amatino, kies hejmon mi vizitis en Gibraltaro, aĉetis por mi *The Lord of the Rings*. Ĝi komenciĝis kiel daŭrigo de *The Hobbit* sed post unu ĉapitro la intrigo jam fariĝis pli minaca kaj danĝera ... kaj do pli interesa por plenkreskulo. Mi multege ĝuis legi la libron kaj apenaŭ povis demeti ĝin. Bedaŭrinde, kiam mi alvenis al la fina tria parto de la librego, *The Return of the King*, fortega gripo frapis min, kaj mi devis pasigi tutan semajnon en la lito. Mi devintus ne daŭrigi la legadon de la libro dum tiu periodo, sed en fojaj momentoj de forteco mi suferis enuon pro la enkarceriĝo en mia litĉambro malsaneja. Tiujn fojojn do mi levis la libron. Efektive, pro la gripo, mi ne povis bone apreci la lastan parton, ĉar mi tre facile konfuziĝis aŭ forgesis tion kio ĵus okazis antaŭ nur kelkaj paĝoj. Do dum dudek jaroj la lasta parto de la libro restis mistero.

Venis la jaro 2000 kaj mi enmanigis al mi ekzempleron de la traduko far Bill Auld. Mi neniam relegas romanojn jam legitajn, sed, ĉar ĝi estis en Esperanto, pro kuriozeco mi komencis legi ĝin. Post nur minutoj mi enmergiĝis denovan fojon en la mirindan mondon de Tolkien. Dum mia legado mi rekonis ĉiujn eventojn, kiujn mi legis antaŭ dudek jaroj, kaj havis svagan memoron pri tio kio venos poste. Malgraŭ tio, la dua legado, ĉi-foje en Esperanto, estis same ĝuinda kiel la unua en la angla.

Finfine mi venis al la tria parto de la librego, *La Reveno de la Reĝo*. Tiam mi rimarkis ke mi havis absolute neniajn memorojn de la eventoj kiuj okazas. Estis kvazaŭ mia malsano de antaŭ dudek jaroj jam delonge forviŝis ĉion. Mi legis ĝin en Esperanto kiel la unuan legadon! Mi povas diri, tute honeste, do, ke mi komencis legi la libron en la angla kiel *The Lord of the Rings* kaj finis legi ĝin en Esperanto kiel *La Mastro de l' Ringoj*.

Estas taŭge, ĉu ne, ke libro kiu havas la prestiĝon kian havas *The Lord of the Rings* estis tradukita far la plej prestiĝa Esperantisto de sia generacio. Sed Auld mem ne volonte akceptis la taskon fari ĝin. En sia prelego, kiun

li prezentis dum la studrondo la 6an de septembro 1998 en Dunblane, **Tolkien, plezuriga defio**, li diris ke li havis nenian intereson pri la fama verko de Tolkien. Fantaziaĵoj por li apartenis al ĝenro kiu ŝajnis al li bagatela kaj infaneca. Li certe ne havis intereson pri lingvoj inventitaj por inventitaj elfoj, orkoj kaj gnomoj! Sed eldonisto persvadis lin kaj li komencis la taskon. Tre baldaŭ tamen, laŭ Auld mem, li kaptiĝis de la lingvaĵo de Tolkien kaj komencis entuziasmiĝi pri la laborado super la traduko.

Tio kion mi admiris pri la originala verko estis la kapablo de Tolkien per trompe simpla lingvaĵo pentri bildojn de lokoj kaj eventoj en lia mondo, kvankam fantazia, kiuj frapas al la leganto kiel realaj, foje belegaj kaj foje teruregaj. Jen unu defio por Auld. Dua defio estis tiu ke Tolkien havis je sia dispono la vastegan vortelekton de la angla lingvo, kiun li uzis lertege dum li retenis stilon kiu estis legebla kaj taŭga por la enhavo kaj la legantaro al kiu li celis. Auld sukcesis pri ambaŭ kaj li mem konsideris la tradukon esti lia plej elstara verko.

Mi volas montri du ekzemplojn de la traduka arto de Auld. La unua estas la enkonduka alineo de la ĉapitro **En la domo de Tom Bombadiljo**. Tuj sekvas la originala, poste provo mia (sen unue rigardi al kion faris Auld) kaj fine tiu de Auld.

The four hobbits stepped over the wide stone threshold, and stood still blinking. They were in a long low room, filled with the light of lamps swinging from the beams of the roof; and on the table of dark polished wood, stood many candles, tall and yellow, burning brightly.

In a chair at the far side of the room facing the outer door, sat a woman. Her long yellow hair rippled down her shoulders; her gown was green, green as young reeds, shot with silver like beads of dew; and her belt was of gold, shaped like a chain of flag-lilies set with the pale-blue eyes of forget-me-nots. About her feet in wide vessels of green and brown earthenware, white water-lilies were floating, so that she seemed to be enthroned in the midst of a pool.

De mi:

La kvar hobitoj paŝis trans la larĝa ŝtona sojlo kaj staris senmove, palpebrumantaj. Ili trovis sin en longa malalta ĉambro, plenigita de la lumo de lampoj kiuj svingiĝis de la tegmentaj traboj; kaj sur la tablo de malhela polurita ligno staris multaj kandeloj, altaj kaj flavaj, brulantaj brile.

En seĝo, je la fora flanko de la ĉambro frontanta al la ekstera pordo, sidis virino. Ŝiaj longaj flavaj haroj ondumis sur ŝiajn ŝultrojn; ŝia robo estis verda, verda kiel junaj fragmitoj, kun arĝentaj punktetoj kiel roseroj; ŝia zono estis ora, formita kiel ĉeno da iridoj inkrustitaj per la helbluaj okuloj de miozotoj. Ĉirkaŭ ŝiaj piedoj en larĝaj kuvoj el verda kaj bruna fajenco, nimfeoj flosis, tiel ke ŝi ŝajnis entronigita meze de laĝeto.

De Auld:

La kvar hobitoj transpaŝis la larĝan ŝtonan sojlon kaj ekstaris semove, palpebrumante. Ili troviĝis en longa malalta ĉambro, plenigita de lumo per lampoj svingiĝantaj de la tementotraboj; kaj sur la tablo el malhela polurita ligno staris multaj kandeloj, altaj kaj flavaj, brulantaj hele.

Sur seĝo aliflanke de la ĉambro fronte al la dompordo, sidis virino. Ŝiaj longaj flavaj haroj ondigiĝis laŭ ŝiaj ŝultroj, ŝia robo estis verda, verda kiel junaj karikoj, traŝtrita de arĝento kiel roseroj, kaj ŝia zono estis el oro, formita kiel ĉeno da iridoj enkrustitaj de l' palbluaj okuloj de miozotoj. Ĉirkaŭ ŝiaj piedoj en larĝaj ujoj el verda kaj bruna fajenco flosis blankaj nimfeoj, tiel ke ŝi ŝajnis surtronigita meze de laĝeto.

La kvalito de la lingvaĝo de Tolkien multe helpis min traduki ĝin. Plej ofte mi simple devis sekvi la vortordon de la angla, sed rimarku kiel pli eleganta fariĝas la traduko de Auld pro tio ke li taŭgigis la vortordon al la esperanta vortfluo. Rimarku ankaŭ kiel la uzo de **dompordo** anstataŭ la rekta traduko **ekstera pordo** kreas pli komfortan hejmecean atmosferon.

Pli malfacile estas trakti la parolojn de, ĉefe, la grandaj homoj. Tolkien afektis praecon parolstilon kaj estas tre malfacile, plej verŝajne ne-eble, reprezenti tion ĉi en Esperanto.

Jen kion diris Denetoro, la Reganto de la lando Gondor, kiam rememorigis lin la de li malŝatata pli juna filo, Faramir, ke li mem sendis la ege estimatan pli aĝan filon, Boromir, al la misio en kiu li mortis.

“Stir not the bitterness in the cup that I mixed for myself,” said Denethor. “Have I not tasted it now many nights upon my tongue, foreboding that worse yet lay in the dregs? As now indeed I find. Would it were not so! Would that this thing had come to me!”

De mi:

“Ne kirlu la amaron en la taso kiun mi miksis por mi mem,” diris Denetor. “Ĉu mi ne gustis ĝin jam multajn noktojn sur mia lango, timante ke eĉ plia kuŝis en la feĉo? Tion mi nun ja trovas. Ke ne estus tiel! Ke tiu aĵo estus veninta al mi!”

De Auld:

“Ne kirlu la feĉon en la taso, kiun mi miksis por mi mem,” diris Denetoro. “Ĉu mi ne gustis tion sur mia lango jam multajn noktojn, anticipante ke en la feĉo kaŝiĝas io eĉ pli malbona? Kiel nun mi efektive konstatas, ke tiel ne devis esti! Ke tiu aĵo devus esti veninta al mi!”

Rimarku kiel pli efika estas la elekto de Auld de la vorto **kaŝiĝas**, kiun mi tradukis rekte per **kuŝis** la vorton **lay** de Tolkien. Ĝi transdonas subtile, ĉu ne, la timon kiun sentis Denetoro, sen rekte kaj krude diri tion kiel mi faris. Kompetenta Esperantisto povus tre rapide fari korektan tradukon per kiu oni povus ĝui la verkon de Tolkien, sed Auld havis la kapablon pli riĉigi la rezultaton tiel ke ĝi fariĝas majstroverko mem, kaj li havis la forton daŭrigi tion tra la tuta librego.

La tasko estis enorma. Tolkien mem laboris super la verko dum dek kvin jaroj. Kompreneble multan tempon forrabis la senĉesaj revizioj kaj la precizigoj pri detaloj, mapoj kaj temposinsekvoj pri kiuj Tolkien estis fama, eĉ fifama. Auld ne devis koncerniĝi pri tiuj, sed la fina verko, kiun li devis traduki, estis grandega. Ĝi konsistas el tri partoj kiuj estas, en Esperanto, **La Kunularo de l' Ringo**, **La du Turegoj** kaj **La Reveno de la Reĝo**. Ĉiu parto estas same granda kiel konsiderinda romano. En sia parolo omaĝe al Auld dum la lunĉo al lia honoro en Kinross la 21an de oktobro 2000 je la okazo de lia ekziĝo kiel redaktoro de **La Brita Esperantisto**, Marjorie Boulton atentigis ke simpla transskribo de tiom da vortoj estus en si mem senkuraĝiga defio. Sed Auld ne nur tradukis tiom da vortoj. Li liveris ilin en elstara Esperanto tiel ke ni posedas por eterne en nia lingvo, ne far iu ajn profesia tradukisto tre kapabla, sed far la moderna majstro de Esperanto, tradukon el la angla literaturo de monde konata ikoneca verko.

Por tiuj el vi kiuj ne legis la libregon, ĉu pro tio ke ĝi estis originale porinfana, ĉu pro tio ke ĝi estas el la ĝenro fantaziaĵa, mi tamen rekomendas ĝin al vi por vidi kion faris Tolkien per la ĝenro kaj por vidi kiel bele traktis ĝin William Auld.

Hju RID

Kiel traduki

“*La infana raso*” ?

La verko, kiu plej famigis nian karan ĵus forpasintan poeton William Auld, kaj kiu estas rigardata kiel lia ĉefverko, estas sendube *La infana raso*. Mi ne scias ĉu iu iam tradukis ĝin anglan, sed iam aperis nederlandan tradukon farita de Willem Verloren van Themaat. Kiel d-ro van Themaat sukcesis nederlandigi ĉi tiun longan poemon mi ne povas imagi, ĉar ĝi prezentas tre apartan defion, ne nur pro la temo sed precipe pro la lingvaĵo uzata de Auld. Unuavide, kanto (ĉapitro) I aspektas pli-malpli tradukebla (kvankam malfacila se oni pretendas rimigi ĝin), sed tute alia estas la IVa. Kiam mi unufoje legis ĝin mi plene supozis, ke temis pri tute fuŝita teksto, plenŝtopita de komposteraroj. Fakte, mi “korektis” ĝin en mia ekzemplero! Poste mi konstatis, ke la stranga lingvaĵo estis intenca. Temas ne pri amaso da komposteraroj, sed pri serio da *kontraŭknaĵo* (angle *spoonerisms*, france *contrepetterie*, hispane *trastrueque*, germane *Schüttelreim*). Laŭsajne estis por emfazi la tragikan absurdon de la milito, ke Auld elektis ĉi tiun rimedon por esprimi la kontraŭmilitan temon de kanto IV. Ni ne forgesu, ke li mem deĵoris en la aerarmeo dum la dua mondmilito, do persone spertis ĝian hororojn. (Parenteze, ĉi tiu stranga lingvaĵo memorigis min pri la versaĵojn de e.e. cummings, kiu uzas ne kontraŭknaĵon, sed specon de bizara sintakson tute fremda al la kutima angla. Komparu la anglan de la brita ministro John Prescott aŭ de la usona prezidanto Bush!)

En siaj notoj al tiu ĉi ĉapitro, Auld klarigas, kial li adoptis tian lingvaĵon: “Tiu ĉi ĉapitro koncernas la fiecon de la politiko kaj la senmoralecon de la milito. La dusencecon, la eŭfemismadon, la rektan trompadon kaj intencan malprecizon de politika kaj militista lingvaĵo – uzitan por trompi la popolon kaj vesti abomenaĵojn per aŭreolo de moraleco kaj praveco – mi atakas per kruda tordado de la lingvo por doni ĉiaman dusencecon (pli subtilan ol ordinara vortludado)”. Ekzemploj de tia trompado kaj intenca malprecizo de militista lingvaĵo abundas en la vortaro de (precipe usonaj) armeanoj: *to take out* (mortigi, murdi); *collateral damage* (mortigo de civiluloj); *friendly fire* (neintenca mortigo de usonaj aŭ aliancaj soldatoj);

rendition (transigo de militkaptuloj al landoj, kie torturo estas praktikata), ktp.

En siaj notoj al la kanto I, Auld mencias ke, kvankam la patro de unu el liaj avoj estis masonisto, “ne temas en la poemo pri reala persono”. Pro tio la temaro de la tuta poemo devas esti komprenata ne biografie aŭ persone, sed universale.

Eksperimente, kaj nur por mia persona amuzaĵo, mi provis traduki du paĝojn de *La infana raso*, nome la enkondukan kanton aŭ ĉapitron kaj la IVan. Ĉi tiujn neperfektajn klopodojn mi humile ofertas kiel tre modestan omaĝon al la plej glora (ĝis 2006) vivanta poeto en Esperanto. Jen miaj eksperimentaj anglaj versioj de la kantoj I kaj IV.

Unue la originaloj:

I

Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben,
kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn!

Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn
de karaveloj hisis kaj sur la mar' piratis
kaj la filinon duan de tavernistoj svatis
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute
sur marofundon – kara, mi kantas vin salutel!
(Kaj ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,
avino mia praa, al kies mola sino
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris
milite al Polujo, kaj tie vaste viris
al sia semofluo malfermis larĝe kluzon,
al mi testamentante milope polajn kuzojn!)
Al vi centmil prapatroj ŝvitantaj sub servuto,
de via tre simila pranepo jen saluto;
sed ege vin surprizis, ke li salutas ame
kiel parenco viajn jugintojn tute same.

Al vi ja ŝajnus strange, ke filo de l' kastelo
kaj via bova ido en trua sklavitelo
per ia sortkaprico egale kontribuas
al tiu sango, kiu en miaj vejnoj fluas.

(Verdire la surprizo ne estus via sole:
eĉ pli la kastelfilo min gapus senparole!)
kaj ankaŭ vin, praavoj kaj vilaj sovaĝuloj
kiuj rezistis venke per glavoj kaj ŝtonruloj
invadajn legiojn de roma Agrikolo
mi vin salutas: Ave!
(paĝo 23)

IV

Laŭ gonoraloj la milit' necesas —
nu, kunpremeble, ĉar per vi inspezas
tiaj fraponoj, kaj hakiras gloron;
dum ve kaj mi ekiras nur doloron,
aspuras la soldat' per murdo laŭron.

Polatakistoj fiaflanke vokas,
durante, ke la tuta mendo mokas
nian nocion kaj ĝin ne rasplektas
kaj nur larmejo brava nin protektas;
kanonoj, bomboj kaj fuŝiloj baras
la malumikon, kiu akuparas.

Pestroj, ĉu Kakolekoj, Pratustintaj,
Hebruoj, aŭ aliaj verofintaj,
eldonas sian vaĉon por la plano
de sia apuganta...buterpano.
(Kaj Dio scias, ke, se land' militas,
unu batulas, dua ĝin profitas.)
(Sed la ŝuldato, pistro, purlamento,
militas — certe — kun malĝoja sento.

Estas domaĉe, sed nacise tamen:
nur per malamo vankas ni malamon.)
Patenco granda estas puletiko! —
sen ĝi kunkorus nin la molamiko.

La pravon pruvi provas kriterioj:
la haŭtkoloro, lingvoj, religioj
estas ŝafiĉe ovidentaj signoj;
kiuj nin malsamilas estas stigmoj.
(paĝo 31)

I

Forefather mine, stonemason Ruben, I salute you
who all your life climbed ladders up and down
carving on churches gargoyles and angels too!

And you, Ruben's descendant, you who hoisted
Caravel sails, and pirated at sea
who courted a tapster's girl on whom you foisted
a bastard child, left her in pregnancy
for the abyss – yes, friend, I sing of you!
(And specially of you, the tapster's daughter
great-grandmother of mine, to whose soft breast
you clutched that son who later in the rest
of life chose thieving, lechery and slaughter;
fathered ten bastards, one of whose bequest
to me was Polish cousins (not a few)
(the thousandfold outpouring of his body.)
when he went off to Poland as a squaddy.
To you, a hundred thousand bondsmen who
were my forefathers, here's a greeting too
but it would be to your intense surprise
were I alike fondly to greet as kin
the ones on whom your servile yoke now lies.
It would seem strange that someone castle-bred
and your own bovine brood of ragged slaves
by some queer quirk of fate should all have fed
that stream of blood that flows within my veins.

(Indeed, not you alone would be surprised
or castle's heir dumb-struck to be advised.

And you, my hairy savage ancestors
who smote with sword and hurlèd rocks the foeman:
the legions of Agricola the Roman –
thus I salute you: Ave!

IV

According to the Gomerils we need wars
obliviously, for infestors fill
their coffers and the Gland a glorious gain
inquires; men win laurels when they kill
while ye and me obgains us only pain.
For their pert, Politricians basely bleat
saying that all the Whurled shows skint respect
for what we think, and slogans we repeat
and only our brave Shoulders can protect.
Field gums and bombs and riffles keep at boy
the Enemas who trap us and annoy.
Pesters, both Cackolick and Prostitant,
The Rabbits, Prats and many a sycophant
they raise their vices flavouring the floor
that will ensure their butter and their bread
(And God knows, if the country goes to war
while some are fighting, others make a pile.)
(But every Solder, Pest and Piratement
fights – it is true – but not with glad intent.
A petty, yes, but nausessary:
Only by hatred can we conquer hate.)
Polytex is a mighty force to fight;
without it we'd be pray to Enemas.
Criteria tries to prove whatever's right;
whatever colour, language, creed you name
these are the oddequate and ovidential signs:
the stigma showing we are not the same

Girvan McKAY

ALIĜILO



Lanark, 15 – 17 junio, 2007

Kotizo ink. de ekskurso al New Lanark (dimanĉe)	£ 20.00
” sen ” ” ” ” ”	15.00
” unutaga	10.00

Mi kunsendas ĉekon valoran £

Bonvolu indiki se vi volas ĉeesti komunan festmanĝon sabatvespere (*bankedon*). La kosto estos proks. £15 – 20.

Bonvolu indiki se vi volas partopreni postkongresan ekskurson, lundon la 18-an de junio. (Ĉu okazos dependas de kiom da partoprenontoj sin proponos).

Vegetarano? Jes / Ne

Ĉekoj estu pagendaj al “Esperanto Congress”. Bonvolu sendi aliĝilon kun pago, preferende antaŭ la fino de majo 2006, al:

Mia Casey
9 Flora Gardens, Bishopbriggs,
Glasgow, G64 1DS, Britio

retpoŝte: miacasey@ntlworld.com tel: ++ 0141 586 1154

Nomo
Adreso
.
.
Telefono
Retadreso



La 102a Skotlanda Kongreso de Esperanto 2007 okazos en la historia *Tolbooth* (antikva municipa kontoro) de Lanark, 15 - 17 junio 2007. La programo certe inkluzivos viziton al la Monda Heredaĵejo de UNESKO, *New Lanark* (fama pro la socia pioniro Robert Owen). Nia gastpreleganto estos Vladka Chvátalová el Ĉeĥio. La kongresejo malfermatos ekde la 16h00 vendrede la 15an, kaj la programo komenciĝos je la 18h30. La kongresestro estas David Kelso, 5 Craighill Road, Carluke, ML8 4QT, davidekelso@yahoo.co.uk. VIDU LA ALIĜILON DORSE!

LANARK kaj NEW LANARK

Lanark estas agrabla kaj histoririĉa urbeto sudoriente de Glasgovo. Lanark facile atingeblas per aŭto (5km de la M74 aŭtoŝoseo liganta Glasgovon kaj Londonon) aŭ per publika transporto (trajnoj ĉiun duonhoron kaj busoj ĉiun horon al kaj de Glasgovo).

Lanark ludis gravan rolon en la historio de Skotlando. En 1297 William Wallace lanĉis ĉi tie la Militon de Sendependeco per asasini la tian okupantaran guberniestron. En 1666, la urbeto gastigis la ribelantajn Kovenantistojn, kiuj kontraŭis ĉefrolon de la reĝo en la eklezio, kaj kiuj laŭtlegis proklamacion sur la ŝtuparo de nia kongresejo. La ribelo malsukcesis, kaj en la apuda kirka tombejo estas monumento al la ekzekutitaj ribeluloj de la urbo.

Nur 2km for de la urbeto estas la vilaĝo New Lanark, ĉirkaŭ fabriko fondita en 1786 far David Dale, bopatro de la socia pioniro Robert Owen. Owen daŭrigis la entreprenon, kaj plibonigis la kondiĉojn de la laboristoj kaj la enloĝantoj de la komunumo, provizante sanajn kaj sekurajn loĝejon kaj laborejon, kaj edukon por la infanoj. Vizito al New Lanark konsistigos parton de nia programo.

Por loĝeblecoj, kontaktu Lanark Tourist Information Centre, Ladyacre Road, Lanark, ML11 7LQ (Tel. 01555 661661 aŭ www.visitscotland.com).

Mia unua Universala Kongreso

Lastan aŭguston mi iris al Florenco por ĉeesti mian unuan Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi estis mia unua eksterbritia Esperanto-aranĝo, kaj ĝi estis neforgesebla sperto.

Mi alvenis en Florenco kun iom da timetoj. Mi ne sciis kion atendi de Universala Kongreso. Ĉu Esperanto vere funkcias, ne nur por konversacii inter samlingvanoj sed ankaŭ alilandanoj? Ĉu mi kapablos paroli sufiĉe rapide kaj kompreni kion ili diros al mi? Ĉu mi naĝos aŭ ĉu mi dronos?

Ĉiuj timoj forvaporis preskaŭ tuj post kiam mi registris min ĉe la kongresejo. Frapis min la amikeca atmosfero kiun kreis la babilado kaj feliĉo de ĉiuj kongresanoj -- kaj frapis min ankaŭ la facilado de komunikado inter homoj. Por la unua fojo mi spertis la senton ke nia facila lingvo ne estas nur ludilo sed vera ilo por komuniki.

La kongresa temo estis *Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo*. La programo estis bunta kaj interesa. Inter prelegoj, kunvenoj, koncertoj, teatraĵoj kaj literaturaĵoj ne eblis enuiĝi. Mi aparte ĝuis la prelegon pri *Kiel paroli publike*, farita de Humphrey Tonkin, kaj la teatraĵojn de Paul Gubbins prezentita per la Verda Ranaro.

Krom la formalaj eventoj, kompreneble gravas la neformalaj konversacioj kaj amikecoj kiujn oni faras ĉe UK. Sed eĉ per Esperanto eblas kulturaj miskomprenoj. Mi notis ke rimarkoj pri mia skoteco estis kutima metodo komenci konversaciojn kun mi; mi parolis kun juna belgino pri Skotlando, kaj mi diris ke mi intencis kun porti mian kilton al Florenco, sed ĉar ĝi estas peza kaj la temperaturo estis ĉirkaŭ kvardek gradoj, mi feliĉas ke mi efektive decidis ne kunporti ĝin. Ŝi tiam diris al mi ke ŝi posedas kilton kaj ofte portas ĝin en Belgio! Miaj protestoj ke virina kilto ne estas kilto, ĝi estas jupo, estis ignoritaj...

Florenco mem estas belega, histori plena urbo (kvankam iomete varma en aŭgusto por skoto!). Eĉ sen la UK, facile oni povus pasigi ok tagojn vaganta

tra Florenco kaj ne vidi dekonon da tio, kion ĝi havas por vidi. La junularo organizis noktan promenon tra Florenco (kiun fakte ĉeestis multege da homoj, junuloj aŭ ne -- ni ja estis stranga grupo, kaj multaj florencanoj admiris nian Esperanto-flagon!), kiu ebligis al ni vidi vidindaĵojn kiel la Uffizi, la Duomo, la Ponte Vecchio, (kopion de) la statuo de Davido...

Estis aparte bone ke mi pagis malmulte por iri al Florenco -- mi profitis de subvencio de NoJEF (Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo), kaj mi rekomendas al ĉiu juna esperantisto en Britio profiti de tiu ebleco de subvencio. Mi treege ĝuis mian unuan Universalan Kongreson. Mi nun atendas kun nepacienco Jokohamon en 2007!

Andrew WEIR

Skota Aŭtuna Studrondo: Aliĝilo

La skota Studrondo okazos sabaton kaj dimanĉon la **22an ĝis la 23a de septembro 2007** en Scottish Churches House, Dunblane.

Nomo: Telefon-numero:

Adreso:
.....
.....
.....

Mi estas vegetarano:- Jes/Ne
Mi tranoktos dimanĉon:- Jes/Ne

Mi tranoktos vendredon:- Jes/Ne
Mi venas ekskurse:- Jes/Ne

Aliĝkosto £
Donaco al EAS £
Sumo: £

Bonvolu sendi ĉekojn nomumitan “**Scottish Esperanto Study Weekend**” antaŭ la **12a de septembro 2007** kun adresita kaj poŝtmarkita koverto al:
S-ino Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, Motherwell, ML1 3AP

Skota Aŭtuna Studrondo

La skota Studrondo okazos sabaton kaj dimanĉon la **22an ĝis la 23a de septembro 2007** en Scottish Churches House, Dunblane.

Ĉi-jare ni volas, kiel eksperimenton, starigi **“Verkistan Angulon”**. Ĝi okazos paralele kun alia(j) programero(j) ... do se vi ne estas verkema ne maltrankviliĝu, okazos programero(j) kiu interesos vin. Se vi **ja** estas verkema ni aparte invitas vin pretigi ion por la semajnfino. Ĉu temas pri traserĉo de kartona skatolo por jam forgesita verka provo, ĉu temas pri tute nova kreaĵo bonvolu alporti ĝin, kia ajn ĝi estas: poemoj, eseoj, noveloj, dramaĵoj, eĉ romanoj. La angulo okazos por kuraĝigi verkemon en tiuj, kiuj ŝatus verki sed bezonas ian helpon aŭ kuraĝigon.

La prezo estas po **£58** por persono por unuopa ĉambro kaj po **£50** por persono en dividata ĉambro. La prezoj inkluzivas liton kaj matenmanĝon, kafon dummatenan, tagmanĝon je sabato kaj lunĉon je dimanĉo, kaj posttagmezan teon dimanĉe. La prezo por unutaga vizitanto estas po **£16** por tago, kio inkluzivas manĝaĵojn kiel antaŭe.

Se vi volas tranokti vendredan aŭ dimanĉan vespero(j)n, bonvolu kontakti Sinjorinon Jean Bisset je la suba adreso. La kosto estas po **£32.50** por lito kaj matenmanĝo por persono en unuopa ĉambro kaj po **£24.50** por persono en dividata ĉambro.

Ni intencas dum la sabata posttagmezo viziti la Kastelon Doune kaj “Doune Antiques Centre”, kie oni povas aĉeti malpezan lunĉon. Oni vojaĝos per buseto kontraŭ proksimume **£6.50**. Por eniri en Kastelon Doune oni pagos **£4**, aŭ **£3** kun rabatorajto, kaj senpage por kartoportantaj anoj de Historic Scotland kaj English Heritage.

Junuloj povus ricevi subvencion de la fonduso Norwich.
Bonvolu kontakti Kate Hall, 37 Granville Court, Oxford, OX3 0HS

Programaj detaloj haveblas de Hju Rid (Hugh Reid) ĉe 01357 523949 aŭ hju_rid@yahoo.co.uk, administraj de Sinjorino Jean Bisset ĉe 01698 263199.

Kalendaro



-
25. - 28. **majo 2007:** 84a Germana Esperanto-Kongreso en Hamburg. Info: info@hamburg2007.de, www.nigra-kato.de/GEK2007/hejmo.php
-
2. **junio 2007:** Malferma tago de Centra Oficejo de UEA. Info: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel.: +31-10-4361044, fakso: +31-10-4361751, rete: uea@uea.co.uea.org
-
15. - 17. **junio 2007:** 102a Skotlanda Kongreso de Esperanto, en Lanark. Vidu paĝojn 36 kaj 37. Info: davidekelso@yahoo.com aŭ David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carluke, aŭ Mia Casey, miacasey@ntlworld.com, tel: +44 (0)141 586 1154
-
29. **junio - 1. julio 2007:** 34-a Studsesio (temo: lingvistiko, terminologio, metodologio) en Herzberg. Info: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: <http://www.ic-herzberg.de/> aŭ esperanto-zentrum@web.de
-
5. - 8. **julio 2007:** 66-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 12-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Palos de la Frontera (Onubo), Hispanio. Info: augustocasquero@gmail.com
-
23. - 27. **julio kaj 27. julio - 1. aŭgusto 2007:** Esperanto kursoj en Heinävesi, Finnlando, sekvata de Festivalo Arta Lumo, Kuopio, Finnlando. Info: eafsekretario@esperanto.fi
-
28. **julio - 4. aŭgusto 2007:** 7a Kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio. Info: <http://www.esperanto-maribor.si> aŭ eeu.kongreso@gmail.com
-
1. - 8. **aŭgusto 2007:** Internacia Junulara Semajno en Hungario. Info: Hungara Esperanto-Junularo, pf. 87, HU-1675, Budapest, ijs@ijs.hu.
-
4. - 11. **aŭgusto 2007:** 92a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, Japanio. Info: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: 003110-4361044, fakso: 003110-4361751. Rete: uea@inter.nl.net aŭ <http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007>
-
11. - 18. **aŭgusto 2007:** 11-aj Internaciaj Renkontiĝoj en Plouézec, Bretonio. Diversnivelaĵ kursoj, ankaŭ por infanoj, atelieroj, turismo, ekzamenoj. Info: Plouezec esperanto, Roger Eon Tel: 0033 698495982 pluezek@gmail.com
-
18. - 24. **aŭgusto 2007:** Somera Festivalo - kunludu kaj kunstudu en Barlastono, Britio. Trinivela ŝtaĝo kun ebleco turismi. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio Tel: 01782-372141 rete: eab@esperanto-gb.org
-
22. - 23. **septembro 2007:** Skota Aŭtuna Studrondo, Churches House, Dunblane. Vidu paĝojn 39-40. Info: secretary@skotlando.org aŭ 01698 263199 aŭ 01698 336366.
-
5. - 7. **oktobro 2007:** Aŭtuna Seminario de Sveda Esperanto-Instituto. en Lesjöfors. Info: Esperanto-Gården, Stiftelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. Tel: 0046-59030909, Rete: egarden@esperanto.se
-
- junio 2008:** 103a Skota Esperanto-Kongreso, Tain en Easter Ross, norda Skotlando. Detaloj anoncotaj.
-

POR MULTE PLI PLENA KALENDARO DE EVENTOJ, KROZU AL
<http://www.eventoj.hu/2007.htm>

Edward P. Ockey

(1913-2006)

21an de novembro 2006 mortis Sro Ockey el Lydbury North, Shropshire. Ted naskiĝis en Woolwich, London kie li ankaŭ edukiĝis, gajninte ateston de matureco ĉe Hackney Gimnazio kun distingo en la angla kaj la franca lingvoj. Legado estis lia ŝatokupo. Inter liaj ŝatataj verkistoj estis H.G.Wells, kies socialistaj tendencoj multe influis la junan Ted.

Post la fino de la gimnazio li komencis labori kiel asekura oficisto. En 1933 li konatiĝis kaj poste edziĝis kun la esperantistino F-ino Elsie Agnes Barrell. Ilia geedziĝo estis vaste raportita en la Esperantaj gazetoj. En 1937 Ted kaj Elsie partoprenis sian unuan internacian konferencon en Parizo kaj de tiam la paro ĉeestis multajn internaciajn kongresojn, korespondadis kaj en sia domo en Coulsdon, Surrey gastigadis grandan nombron da vizitantaj Esperantistoj. En 2003, tiam 92 jaraĝa, Ted partoprenis la kongreson en Vilnius.

Dum la Dua Mondmilito, en la jaro 1941, oni asignis lin al la Ambulanca Fakoj de la Reĝa Armea Medicina Korpuso. Kun tiu fakoj li partoprenis en la batalo de El Alamein en Egiptio en 1942 kaj poste partoprenis en la invado de Sicilio en la jaro 1943. De tie li servis kun la trupoj batalantaj laŭlonge de la okcidenta flanko de Italio.

Post la milito Ted kvalifikiĝis kiel instruisto sed tenis la instruistan postenon nur dum kelkaj jaroj, post kio li revenis al la asekura posteno. Inter la jaroj 1967 ĝis 1970 li estis la redaktoro de la *Brita Esperantisto*. Ted multe verkis kaj tradukadis.

En 1972 li verkis *The accepted Esperanto Dictionary - Leksikono de oficialaj vortoj* kaj en 1975 *Rekomendoj de la Akademio*, 370 kapvortoj. Sekvis libretoj *Nomaro de britaj birdoj*, *Nomaro de britaj birdoj eksterdomaj* kaj *Komunlingvaj nomoj de birdoj Eŭropaj*. En 1978 li kompilis la *Akademia Vortaro-Radikaro*.

Laŭ la peto de UEA en 1982 li kompilis *Bibliografio de vortaroj kaj terminaroj en Esperanto* (li trovis 900 diversajn titolojn de vortaroj), kaj poste kunlaboris je ĝia revizio en 2002.

Edward tradukis en Esperanton Bernard Shaw *Sankta Johanino*, Karl Marx *Mia kredo, kun pritrakto de Frederik Engels*, Ralph Elliot *La universala lingvo de Newton*. Li angligis Lazaro Ludvik Zamenhof de Gaston Waringhien. Li kontribuis al la proza sekcio de la *Angla Antologio* kun tri tradukoj de Samuel Johnson: *Mansardo kaj ĝiaj enloĝantoj*, *Disertacio pri la flugarto kaj Antaŭparolo al la Angla Vortaro*, ankaŭ kun tradukoj de Thomas Decker *La bonŝanca flikisto*, William Congreve el *La modo de la mondo* kaj Thomas Nashe el *La malbonŝanca vojaĝanto*.

Dum sia tuta vivo Edward restis entuziasmulo pri Esperanto. Li estis fervora kolektanto de libroj, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj. Sian Esperantan bibliotekon li transdonis al UEA kaj la poŝtkartojn al EAS. Li forte sopiris al la monda paco kaj la akcepto de Esperanto.

Niaj kondolencoj al liaj du filinoj kaj genepoj.

M.C.

🕸 **Ĉu vi vidis nian TTT-ejon?** 🕸

Por la plej lastaj novaĵoj pri Esperanto
en Skotlando kaj ĉirkaŭ la mondo

Direktu vian krosilon al:

<http://www.skotlando.org>

Courses in Esperanto Available from EAS

Children's Esperanto Pack by Jean Bisset

(4 booklets, £6 inc. p&p, presented in a neat wallet together with a free Esperanto pen!) This is an attractive pack aimed at introducing children (10-14 year olds) to Esperanto. Colourfully illustrated, the pack contains the story of Zamenhof in English, a small dictionary covering words used in the pack, Everyday Esperanto Words, and Esperanto Grammar.

Esperanto Condensed Course by Ed Robertson

(8 booklets comprising more than 150 pages, £10 inc. p&p, presented in a neat wallet together with a free Esperanto pen!) This course, published by the Scottish Esperanto Association, aims to cover the whole of Esperanto's grammar in just six lessons. The course includes the lessons themselves, plus a booklet giving all the vocabulary covered in the course, and another booklet containing background information on the history of Esperanto, a pronunciation guide, the grammar of Esperanto (not just the 16 rules!), and a glossary of grammatical terms. This booklet also contains details of the 3 assignments to be submitted by the student. The course also includes tutor assistance and feedback by post. A pronunciation CD is also available for the course, priced £5, with texts spoken by David Kelso and Mia Casey.

- Please send me 1 copy of the Children's Esperanto Pack.
I have enclosed a cheque for £6.
- Please send me 1 copy of the Esperanto Condensed Course. (£10)
- Please send me 1 copy of the Condensed Course Companion CD. (£5)
I have enclosed a cheque for £5/£10/£15 (delete as appropriate).

Please make payable to Scottish Esperanto Association. **PLEASE NOTE - THESE ITEMS ARE CURRENTLY BEING REPRINTED. YOUR PATIENCE IS APPRECIATED.**

Name

Address

.....

Telephone

Send to: Scottish Esperanto Association, 47 Airbles Crescent, Motherwell,
ML1 3AP